# LA VERDA LUPEO.

## fenikso.

N-ro 36 1976-12-01 Sepa jaro N-ro 2.

---

K a r a j  L e g a n t o j ,

Mi devas unue danki speciale tiujn el vi kiuj bonvolis respondi al miaj alvokoj, la ricevitaj informoj estis komunikitaj al S'ro I. Paulsonn kiu decidos.

Pri la titolo de nia bulteno, mia propono estis akceptita de la plimulto, kelkaj eĉ entuziasme, sed via prezidanto rifuzis ĝin akcepti pro diversaj motivoj, do pri ĉiu afero bonvolu de estonte rilati nur kun li, mi devis konstati ke ni ne havas la saman vidpunkton pri multaj problemoj, mi pensas ke nia fako nepre devas enhavi ĉiujn esperantistajn kolektantojn, ne nur tiujn kiuj kolektas nur esperantaĵojn sed ankaŭ tiujn kiuj kolektas neesperantistajn kolektindaĵojn kiel poŝtmarkoj, moneroj, biletoj kaj tiel plu.

Se ni volas vere kaj frukte propagandi Esperanton ĉe ĉ i a j kolektantoj medioj, precipe filatelaj kiuj estas la plej gravaj en tutmondo, ni devas akcepti egalrajte ĉiujn, estas mia vidpunkto, do decidu vi mem pri la estonto de via asocio, mi mem restas fidela al mia agado en nia movado kaj al mia devizo kiu estas grupigi la plej grandan nombron da esperantistaj kolektantoj.

Raŭl M E L O

+++++++++++

Redaktoro : Raul M E L O
34, Av. de Russie
F. 03700 BELLERIVE S/ Allier Francujo
Tel: (70) 32.04.61

++++++++++

I.Raporto el Internacia Filatelista Ekspozicio ĈSR-PRL .

De 4a ĝis 19a.9.78a en OSTRAVA (Cs.) okazis intern. ekspozicio de Ĉeĥoslovakaj kaj polaj filatelistoj .Mi vizitis tiun ekspozicion dum renkonto de ĉeĥaj kaj pola Esp.sekcioj kaj mi precize trarigardis nur Esp.kolektojn ĉi tie montritaj .

Entute estis ekspoziciitaj sep Esp.kolektoj — 6 ĉeĥaj kaj 1 pola —. Ĉiuj prezentitaj kolektoj montris abundan kaj unikan filatelan materialon pri Esperanto .

S'ro V.VANA el Plzen montris " Gravaj eroj el historio de Esperanto . En kolekto jenaj raraĵoj kiel : rekom.kv kun Esp.etikedo de Praha 1921 , rekomand.kv kun reko stampo de Krakow 1931 , manskribitan pk de Dro L.K.Z. Gia kolekto gajnis grandan orumitan medalon .

S'ro D.BARTOŜIK el Praha fama konata kaj eminenta ekspoziciisto montris "" Historio kaj nuntempo de E." sed ĉi tie estis montrita nur parto de lia unika kolekto ĉar kaj valoran kaj raran materialon li sendis al filatelista ekspozicio en Sovetunio . Mi devas mencii ke Esp.kolekto de s'ro Bartoŝik sistempe servis kiel modelo por niaj nunaj kolektoj, ĉar li estas pioniro jam de E.filat in kampo .!!

Lia kolekto ricevis grandan arĝentan medalon .

S'ro V.HAVALA el Otroznice montris " E. en filatelo kaj lia kolekto ricevis malgrandan arĝentan medalon .

S'ro J.HAJNIK el Jakartovice montris " Esperanto ĝia kreo kaj evoluo "" .Lia kolekto estis premiita per granda arĝentumita medalo .

S'ro A. JAKUBEC el Hranice na Moravia ekspoziciis "" E. internacia lingvo "" kaj lia kolekto ricevis malgrandan arĝentumitan medalon ,

S'ro J.MIKULSKI el Pollando montris kolekton s.t. " ESPERANTO lingvo de nacioj "" .Lia kolekto ricevis grandan arĝentumitan medalon

S'ro V.VANA el Plzen montris ankoraŭ duan kolekton s.t. " E. tutaĵajn " kaj por ĉi kolekto li ricevis arĝentumitan medalon.

Mi devas diri ke ĝis hodiaŭ nenie en la mondo estis ekspoziciita samtempe tiom da E.kolektoj kaj Ĉeĥoslovakio apartenas al tiu lando kiu posedas plej multe prilaborita E.kolektojn por filatelistaj ekspozicioj .

Mi gratulas la ĉeĥoslovakajn samkolektantojn por iliaj sukcesoj je la filatela kampo, ĉar per tio oni bonege popularigas nian karan lingvon .

ST. B I E S I A D A .

=====

DUA PROVIZORA ALDONO por la poŝtstampa katalogo de AEK .

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| AU 19 | Villach | 1975 | 10-16.5 | 27-a IFEF-kgr cif. |
| DA 8 | København | 1975 | 26.7-2.8 | 60-a UK |
| FRA 42 | Montpellier | 76 | aprilo | Nacia E-kgr -ms- |
| HI 18 | Lerida | 75 | 18-22.7 | 35a nacia E-kgr |
| HU 45 | H'vasarhely | 75 | 11.5 | E-tago |
| HU 46 | Gyula | 75 | 8-16.7 | 13-a S E U |
| HU 47 | Abaliget | 75 | 13-21.7 | 8-a I R E N |
| HU 48 | Budapest | 75 | 21.8 | 4-a Varia E-semajno |
| HU 49 | Esztergom | 75 | 21.8 | sama (ŝipa poŝto) |
| HU 50 | Budapest | 75 | 31.12 | 5-a V E F |
| HU 51 | Mako | 76 | 16.5 | E-Pacrenkonto |
| HU 52 | Komlo | 76 | 25-27.6 | 26-a nacia E-kgr |
| HU 53 | Szeged | 76 | 3-4.7 | Fervojista E-renk. |
| HU 54 | Abaliget | 76 | 18-27.7. | 9-a I R E N |
| IT 25 | Roma | 1975 | 11-16.7 | 36-a IKUE-kgr |
| JA 20 | Seto | 1976 | 21-22.8 | 63-a nacia E-kgr |
| JU 22 | Pohorje | 1975 | 19.4 | Fervojista E-renk. |
| JU 23 | T.Drezel | 1975 | 19.9. | Trilanda E-konf. |
| NE 14 | Gravenhage | 1975 | 26.7-2.8 | 48-a SAT-kgr |
| SVE 21 | Skelleftea | 76 | 12-18.6 | 28-a IFEF-kgr |
| SVE 22 | Gotenburgo | 76 | 24-31.7 | 49-a SAT-kgr |
| PO 115 | Poznan 2 | 1974 | 23.9 | Foiro |
| PO 116 | Krakow | 1975 | 11.5 | Fila-ekspo |

Laŭ la klarigoj ricevitaj de s'ro R. BURMEISTER kiu redaktis ĉiun aldonon al la unua aldono , nia kunlaboranto precizigas ke tiu listo ne estas kompleta ĉar la informojn li nur kaptis hazarde , nia kolego estas preta redakti konstantan rubrikon "" NOVAJ STAMPOJ "" se li ricevas regule informojn de la membraro .

Notu lian adreson : Rudolf BURMEISTER
P.K. 30 . 95 . 39
DDR 90 Karl Marx Stadt
orienta Germanujo .

++++++++++++

# Esperanto en la filatelo

## *Poŝtstampoj*

Kiuj poŝtstampoj estas kolektindaj por Esperanto-kolektajo? Ĉiuj, kiuj tuŝas la internacian lingvon. En mia kolektajo mi trovis jenajn grupojn:

a) Esperanto ĝenerale. Stampoj kun la vorto Esperanto aŭ simila mallonga teksto. Ekzemple nia bildo n-ro 1.

b) Jubileoj de Esperanto. Ni memoras pri la stamposerioj en Svislando, Nederlando kaj Pollando.

c) Esperanto-movado. Stampoj kun nura indiko de Esperanto-organizajoj kaj gazetoj.





d) Esperantistaj okazajoj. Kongresoj, renkontiĝoj, konferencoj, inaŭguro de monumentoj ktp. Ekzemple niaj bildoj n-ro 2 kaj 3.

e) Zamenhof. Stampoj memorigaj pri liaj naskiĝtago kaj mortotago.

f) Esperantlingva varbado por ne-esperanta afero. Multaj tiaj aperis en Pollando, ekzemple okaze de Internacia Semajno de Korespondado, Internacia Foiro en Poznan ktp.


g) Stampoj memorigaj pri esperantistoj pro ne-esperanta okazo. Mi ne scias multajn; en Germanujo ekzemple aperis stampo honore al Ciolkovski.

h) Stampoj pri la mondlingva problemo krom Esperanto. Tiu rubriko koncernas la malmultajn stampojn pri Ido ktp.

La poŝtoj uzas diversajn tipojn da stampoj, kiujn ni ankaŭ atentu. Kutimaj stampoj estas la rondaj aŭ aliformaj, kiuj senvalorigas la poŝtmarkoj. La specialaj tekstoj aŭ bildoj estas aranĝitaj kun la dato kaj urbo. Krom tiuj normalaj „specialaj stampoj" ekzistas kelkaj apartaj.

Maŝinstampoj: Apud la ronda stampo, kiu montras urbon kaj daton, aperas varbcela teksto. Ambaŭ partoj estas samtempe stampitaj, ili troviĝas sur la sama stampilo. Ekzemplo por maŝinstampo estas nia bildo n-ro 2.

Apudstampoj: Varbcelaj stampoj kiuj ne senvalorigas la poŝtmarkojn, sed troviĝas apud la senvaloriga stampo. Ekzemplo estas nia bildo n-ro 3. Ankaŭ en Brazilo aperis apudstampoj pri Esperanto.




Bone atentu: Apudstampo laŭ filatela vidpunkto estas nur tiu, kiu estas stampita de la poŝto.

Gazeta stampo: En Brazilo la gazetoj transportitaj de la poŝto estas stampitaj per triangula stampo, kiu i.a. montras la nomon de la gazeto.

Afrankomaŝina stampo: En multaj landoj firmoj kaj privatuloj rajtas afranki poŝtaĵojn per propra maŝino. Oni rajtas uzi varbcelan parton en la stampo. Rigardu ekzemple nian bildon n-ro 1.

Tiu konciza superrigardo montras la diversecon en la poŝtstampa fako. Kiu kolektas poŝtstampojn pri la temo Esperanto, decidis por ege interesa kaj tute ne enuiga okupo.

H. Heiss, Oberkirch, Germanujo

## N U M I S M A T I K O .

Okaze la Ia olimpika kongreso kiu okazis en 1973a en urbo VARNA (Bulgario) la bulgara nacia banko eldonis arĝentan moneron valoro Io levoj, la moneron oni akuzis kiel regula kiel pagrimedo ek de la Ia de Julio 1976a.

Su la fasado flanko de la monero estas reproduktata la unua olimpika monero emisiita dum la 3a jarcento antaŭ la nova erao . Sube de la olimpika monero estas la simbolo de la olimpikaj ludoj — kvin olimpikaj ringoj — .Cirkaŭ la rond de la monero : subskribo en bulgara lingvo "" DEKA OLIMPIKA KONGRESO"" malsupre VARNA .

Sur la kontraŭa flanko de la monero estas la ŝtata blazono, sube de ĝi , la valoro " Io leva "" , Ĉirkaŭ la rondo de la monero la vortoj "" narodna republika Balgaria "" ( popola res ubliko bulgario ) .

Sur la rondo de la monero est gravitaj bulgarlingvaj vortoj : sporto, por unu paca mondo .

Estas ankaŭ alia varieŭo, sur la rondo estas gravitaj por latina lingvo la vortoj "" pli rapide ,pli alte , pli forte .

L.LEVICARUV .

-+-+-+-+-+-+-+-+-+=

A L B U M O pri poŝtmarkoj kun esperanto - teksto .

Restas ankoraŭ deko da ekzempleroj eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj .

Prezo : 17 francaj frankoj afrankite ne rekomendite aŭ I2 internaciaj respond-kuponoj , por la registrado aldoni fr.fr; 5,50 aŭ kvar internaciaj respond-kuponoj

mendi al : Raŭl MELL , 34 , Avenue de Russie
F.03700 BELLERIVE s/Allier Francujo .
——poŝtĉekkonto : PARIS ISI8.09 ——

+++++++++++++++++++++++++++++

N I A J A N O N C E T O J ..................
.......................................................
. ( rezervitaj por niaj membroj ).

S'ro L.J.WULFERS , Lindanustraat I6 , NIJMEGEN Nederland dezirus interrilati kun kolektantoj de Esperanto-glu - markoj kaj Esperanto poŝtmarkoj .

Ŝ'ro Evaristo GIL PALLARÉS, Apartado 875 BARCELONA (Hispanujo). interŝanĝas NUR stampojn kaj tutaĵojn memorigajn, unutagajn, ordinarajn eĉ maŝinajn afrankojn pri la temoj : muziko , festivaloj, folkloro, operoj, muzikistoj ktp ... ŝportaj olimpiadoj, futbalo, biciklad̂oj ktp.... ŝakludo, fervojoj, urbaj transportoj, maraj lumturoj .....

---

S'ro Jan SIGDA , Skr.Poczt 42 PL.27 200 STARACHOWICE Pollando .kolektas ĉiujn neuzitajn PM kaj overtojn kun E. stampoj pri pentristoj, ruĝa-kruĉo , interŝanĝe povas sendi la samajn el Pollando, Germanio GDR, sovietunio k t p .. respondas al ĉiuj .

---

S'ro Dro Rosetel PRODANESCU, C.P. 5817 , R.75500 BUCUREŜTI 61 .Rumanujo . deziras interrilati por interŝanĝi janajn esperantaĵojn: PM UTK'ojn,stampojn tutaĵojn,insignojn , glumarkojn .

---

S'ro Stanislaw BIESIADA , Skr.Poczt.44, PL:42-217 Czestochowa 17 . Pollando . petas helpon por akiri neuzatan aŭstran aerogramon eldonita en 1950a okaze speciala flugo WIEN – PHILADELPHIA kaj aŭstran P K kun E. PM . Havas eblecon pagi pere de kanadaj dolaroj. atendas konkretan oferton .

---

S'ro Nikolaj STARODUBCEV , poste restante, SU.340047 DONECK ( Sovietunio ).deziras interrilati kun kolektantoj de E.glumarkoj pri E.eventoj, UTK ,specialaj PK kaj PM pri E.eventoj .

---

S'ro Vilmos RADNAI , postfiĉh 40 , H.2331 DUNAHARASZTI (Hungario ).kontraŭ 2 internaciaj respond-kuponoj sendas amason da glumarkoj memorigaj kaj poŝkazaj .

---

S-ro Marc Blondeel,22,rue Claude Debussy, F-59130 LAMBERSART kolektas uzitajn pm el la tuta mondo.Deziras korespondi por interŝanĝi pm.

S'ro Alberto PEDRO DA SILVA , Rua Antonio Ferreira 9 3º Esq. LISBOA 5 Portugalio . deziras interrilati pri NUR glumarkoj, esperantistaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj .

---

S'ro Johannes PALU , Uolme 2I , SU.2OOOTO TALLINN Estonio USSR . interrilatas por interŝanĝi esperantistajn : kovertojn cû novajn , ĉu jam uzitajn, oficialajn aû memfaritajn ktp.... E.insignojn kaj fabelojn en esperanto .

---

S'ro Luis VICINO , Laza I45O , I24O BUENOS AIRES 36 (Argentino ) sendus argentinajn neuzitajn PM memorigajn en kompletaj serioj, poŝtajn stampojn de esperantistaj kongresoj en I96Ia kaj I973a en Rosario kontraû ilustritaj libroj, broŝuroj ktp .. ĉio rilate al pentro arto,gravuraĵoj, skulptaĵoj kaj artaj muzeoj , revuojn , kajerojn, maksimum-kartojn

++++++++++++++++++++ ++++++++++

K O N T R AU nur UNU internacia respond-kupono

---

mi sendos liston de esperantistaj kolektantoj elĉerpitaj el nia internacia slipuro .

precizigu bone viajn interŝanĝdezirojn kaj la landojn kiujn vi preferas .

La respondo estos filatele afrankita .

Raûl M E L O , 34 , Avenue de Russie F.03700 BELLERIVE S/Allier Francujo .

--- senpage ni enregistrigos vin en nia slipuro kiu entenas nuns 2OO adresojn, enregistrigitaj depost malpli ol unu jaro .

La senpaga enregistrigo devas esti ĉiujare renovigita

---

NOVAJ ESPERANTISTAJ GLUMARKOJ.

Francujo :

32a kongreso de SAT AMIKARO
9.1u.II Aprilo I977 en Bedarieux Francujo,
dentumita.

Sovietunio :

sendentaj : T I Ñ V I N I976

unu; rektangula formo reprezentas nordan cervon
teksto Tiñvin I976 SEJT I8

la dua rektangul-ovala reprezentas maskon
teksto I976 Tiñvin X konferenco de SEJM

R.M.

---

NOVAJ APERINTAJ STAMPOJ

Francujo :
Montpellier II.III.I976 Kongreso de la grande Motte.

Japanujo :
Seto 2I/22.VIII I976 63a japana kongreso.

W.H.

---

Mia kolektanta historio.

Unue - mi kolektis ĉiajn poŝtmarkojn. En la dua periodo mi kolektis nur porokazajn (komemorativajn) poŝtmarkojn. En la tria periodo, mi komencis kolekti Esperanto-poŝtmarkojn kaj -stampojn, -glumarkojn.

Mi fine, antaŭ nelonge, decidis kolekti "NUR ESPERANTAJN GLUMARKOJN" kaj servas kiel "spertulo pri EGM" de usona glumarka societo. Tial, mi bezonas ĉiom da fresaj informoj pri novaj kaj malnovaj glumarkoj.
Conrad Fisher. Route 6. MEADVILLE /PA 16335-Usono.

---

Radio ROMA - Esperanto, poŝtkesto 320. I-00100 ROMA
Sendu al Radio Roma poŝtkartojn, preferinde kun surpresita poŝtmarko, kaj ne forgesu ĉiam aldoni adreson.

---

# N O V A J  E-POŜTMARKOJ!

Laŭ sciigo al mi aperos novajn Esperantajn poŝtmarkojn en Fujeira kaj Omar.

La serio konsistas el 6 markoj en unu folio;
La bildoj montras: Potretoj de;
1.D-ro Zamenhof kun teksto "Fondinto de Esperanto"
2. Hector Hodler "La fondinto de UEA"
3.Prof. Ivo Lapenna -Prezidanto de UEA.

La aliaj 3 montras bildojn: Libroj kun titolo.
1."La sankta Biblio" (Zamenhof)
2."La nobla Korano"
3."Retoriko" de Ivo Lapenna

Mi ricevis la provpresonde "Fujeira" E-poŝtmarko. Ĝi estas sufiĉe kara, sed certe valoros multe post iom da tempo. La stoko ne estas granda.

Ĝis nun mi nur povas sciigi vin ke la eldono de "OMAR" estas oficiala, kaj aperos verŝajne en decembro 1976.

Pli da detaloj kaj konsiloj por aĉeto venos en venonta numero de la gazeto.

Ivar Paulsson

Nekrologo:

1976-09-13 forpasis nian membron Witold MAJEWSKI, Polio. Li estis vigla kolektanto, kaj ankaŭ vigle kaj aktive partoprenis en la laboro por aktivigi nian movadon. Multaj gesamideanoj renkontiĝis la lastan dimanĉon por omaĝi lian memoron. ELF kondelancas. I.P.

ELF-ESPERANTO LIGO FILATELISTA
AREK-Amika rondo de Esperantaĵ-kolektantoj

Informilo:"la verda lupeo - Fenikso"

Prezidanto:Ivar Paulsson,Algatan 3.S-171 33 SOLNA

Poŝtkonto: 51 57 85 - 4   I.Paulsson,Solna

Jarkotizo: 10 internaciaj respondkuponoj
aŭ egalvaloro sendita al la prezidanto.

---

Pri la nomo de nia asocio kaj informilo.

Ni ja konstatas ke nia asocio havas 2 nomojn,kaj same la informilo,ĉu do jam estas tempo komenci diskuti ŝanĝon?

Ni antaŭ jaro faris voĉdonadon pri la kunligo de la 2 kluboj,kaj oni akceptis ke validas la statutojn de ELF,ankaŭ statutŝanĝo estas necesa.

La estraro petas la membrojn sciigi nin pri la opinio en tiu ĉi afero.

Kiam vi venontjare sendas la kotizon al la prezidanto,sciigi al li vian opinion.

Amike via /Ivar Paulsson/

QQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQQ

Deziras al vi Bonan kristnaskon
kaj novan jaron 1977.
R.MELO.   I.Paulsson.